

FEDERACIAJ INFORMOJ



Reabono : Kruco malsupre de la unua paĝo indikas, ke vi ne renovigis vian abonon por 2006 kaj ke tiu numero eble estos la lasta ! Por solvi la problemon, kontaktu urĝe nian kasistinon, Lucette Négron (40, Chemin des amandiers 34400 Lunel, telefono 04 67 71 05 79 je la horoj de manĝoj) .

Federacia kongreso : Kiel jam anoncote, ĝi disvolviĝos kadre de la staĝo de Batipaume, **dimanĉon la 11an de junio** (ekde la 10a horo – eĉ se ni devos iomete pacienci pro frumatena promenado de la staĝanoj) . **Necesas ekde nun mendi la tagmanĝon (12^E50) kaj nepre antaŭ la 15a de majo** al nia kasistino (adreso supre) . Vespere oni montros lumbildojn kaj vidkasedon pri la busvojaĝo al Vilno kaj la UK tie en 2005 . Se vi deziras partopreni la vesperon, bonvolu ankaŭ plej baldaŭ anonci vian ĉeeston (kaj anticipi mendi la vespermanĝon) . Nia kunveno estos bona okazo por malkovri la restadejon Batipaume (avenue de Rochelongue), renkonti esperantistojn de aliaj regionoj kaj kompreneble partopreni la vivon de la federacio . Venu kun viaj ideoj, proponoj, sugestoj ! *P.S : Se vi jam aliĝis la staĝon, vi ne bezonas kompreneble anonci vin por la manĝo(j) .*

Staĝoj : Printempe oni jam ekplanas siajn feriojn . En nia regiono estas du eblecoj por pasigi semajnon en esperantista etoso, la unua en junio en **Batipaume / Agde (de la 7a ĝis la 14a de junio** – detaloj kaj aliĝilo en la lasta SFS), la dua en **Sète (de la 19a ĝis la 26a de aŭgusto** – vidu p. 5 kaj 6) . Ekzistas aliaj eblecoj tra Francio : en Kvinpetalo (Poitiers), la kastelo de Greziljono (Maine et Loire), en Plouézec (Bretonio)... Nia modesta bulteno ne povas amplekse raporti pri ĉiuj staĝejoj . Se necese, petu informojn de la redaktoro (adreso sur la lasta paĝo) . *Ne forgesu, ke la tarifoj plialtiĝas en majo !*

Kongresoj : Kelkaj federacianoj partoprenis paske la Sat-Amikaran kongreson en Moulins . En 2007 ĝi okazos en Artigues (Bordozo) kaj en 2008 verŝajne en Martigues (13) . La nacia kongreso disvolviĝos en Rennes (de la 5a ĝis la 9a de majo) . ***Se vi aliĝis/os ĝin, bonvolu informi la prezidanton de la federacio (adreso sur la lasta paĝo) .***

Universala Kongreso en Florenco : Fine kaj tutsimple ni uzos la buson de la kompanio Eurolines, kiu haltas en Montpellier . La tarifo (ir' kaj reven') kostas proksimume 130 E sed dependas de la nombro da kunveturotoj . La malavantaĝo estas, ke necesos tranokti en la buso . La horaro estas : **foriro** vendredon la 28an de julio je 23h59, alveno en Florenco je 9h45 ; **reveno** sabaton la 5an de aŭgusto : Florenco 17h15, Montpellier 4h30 . ***Pluraj geesperantistoj pretas kunvojaĝi ; se vi volas aldoniĝi, bonvolu informi Jean Hénin (04 66 32 86 36) nepre kaj plej malfrue antaŭ la 15a de majo.*** Ĉiu esperantisto devus almenaŭ unufoje partopreni universalan kongreson .



Printempa bukedo : novaj metodoj

Laste aperis diversaj metodoj por lerni esperanton :

« **Esperanto Express** » de Renée Triolle – Editions du Dauphin – 150 paĝoj – 22 E . Ĝi kompletigas serion da lingvo-lerniloj kun baza vortprovizo por elturniĝi en ĉiutaga vivo, ekzemple por unuafojaj partoprenantoj de UK aŭ uzantoj de « Pasporta Servo » . Neniu ilustraĵo . Interesa parto kun praktikaj informoj por ekscii pli pri la movado . « **Cours rationnel d'E°** », nova vesto por la konata « Nouveau cours rationnel », kun koloroj, humoraj ilustraĵoj de Serge Sire . 10 E ĉe Sat-Amikaro . Malgraŭ la pli alloga aspekto, la metodo restas la sama kun longaj listoj da vortoj (iuj estas vere balasto por komen-cantoj), gramatikaj klarigoj kaj sen dialogoj . Pluraj paĝoj pri la historio de E° kaj poresperantaj argumentoj . Kiel lernolibro, eble por progresantoj sed ne por komencantoj .

Menciindas du novaj libretoj (ankaŭ ĉe Sat-Amikaro) : « **Esperanto Eclair** » de Raymond Gueguen (Limoges), por rapida prezento de la movado kaj de la lingvo kaj « **Petite grammaire de l'esperanto** » de Claude Gerlat (Grenoble), kompakta sed klara kaj sufiĉe kompleta verko .

VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

Pliaj detaloj pri la staĝo : Gvidos la kursojn Josée Boccadifuoco (1a nivelo), Georges Gonthier (2a), Josée Lafosse (3a/konversacio), Jean-Pierre Boulet (4a) . Temo estis elektita por la ĉi-jara staĝo, « Esperanto kaj ĉirkaŭumo » . Laŭ la priskribo de la prospekto, « *ĉirkaŭumo estas la tuto de la naturaj kondiĉoj kaj ili taŭgas por agi sur la vivantaj organismoj kaj homaj agadoj . Tiu difino permesas ekvidi la diversecon kaj la kompleksecon, kiu kunligas la naturajn kaj la homajn sistemojn . Ĉiutage la amas—informiloj montras al ni la difektadon de la ĉirkaŭumo . Sed samtempe, kolektiva konsciigo aperas por permesi daŭran evoluadon de nia planedo kaj la vivdaŭron de nia specio* » .

Rilate kun la temo de la staĝo estos muzikvespero jaŭde pri temoj de la naturo, piedirado vendrede laŭlonge de la strando kun naturanimantino, por malkovri la postlasaĵojn de la maro kun ilia bestaro, prelego sabaton vespere « manĝi sed je kia prezo ? » (kiu estas la kosto ekologia de la nutraĵo kaj kiel malplialtigi ĝin ?) , viziton dimanĉon matene de la birdrezervejo de Bagnas kaj viziton mardon post-tagmeze de legoma biologia kultivejo .

Kontaktnumeroj pri la staĝo : Christian Herbette 04 67 21 86 61, Suzanne Authier 04 67 31 13 18, dum la staĝo : Centro de Batipaume 04 67 94 11 47

Kunvenoj de la grupo : vidu informojn en la franca p.4

Solidareco : helpopeto .

Ĉu iu esperantistino (aŭ ne, aŭ eventuale paro) bonvolus pasigi kun mi parton de somero (unu monaton aŭ iom pli) marborde en Valras-Plage ? Mi bezonas helpon por aĉeti manĝaĵojn kaj promeni . Mi ne plu povas resti sola . Pli da informoj post skribaj aŭ telefonaj rilatoj kun Suzanne Authier 9, Rue Georges Picot 34500 Béziers, telefono 04 67 31 13 18

MONTPELLIER

Kunveno de januaro


Partoprenis 14 anoj . Unue la prezidantino menciis la sendon de bondeziroj al ĉiuj membroj de la kultura centro, al la urbestro, al la prezidanto de la urbaro, al la prezidanto de la departementa konsilantaro . Iuj el tiuj instancoj respondis gratule . Ŝi memorigis pri la decido plialtigi la kotizon (22[€]). La kultura centro kandidatis por la akcepto de Kubanino, estraranino de UEA . Corinne Daudier, nova membro, prezentis « Wikipedia », enciklopedion per interreto, kie oni povas interveni tute libere, skribi aŭ modifi artikolojn. Pli ol dek homoj konstante kontrolas la modifojn . Serge Eysseric montris la uzfacilecon de nova aparato, aĉetota de la grupo por plilaligi la voĉojn de la intervenantoj . Sekvis la kunvenon gaja manĝo kun dek frandemuloj, kiuj partigis ŝinkon, salaton, kukojn...

Ĝenerala kunveno de la 11a de februaro

Partoprenis 12, sendis prokurojn 9 . La agadraporto kaj la financa raporto estis ambaŭ unuanime aprobitaj . Decido pri la fina aĉeto de sonaparato . Serge Eysseric relegis, je la peto de pluraj membroj, la statutojn de la asocio . Annick Tora anoncis sian deziron ne plu kandidati por la posteno de prezidantino . La nova administra konsilantaro konsistas el Jeanne Bès, Josée Boccadifuoco, Reine Celiqva, Monique kaj Serge Eysseric, Georges Gonthier, Annick Tora . La nova prezidanto estas Serge Eysseric, la vic-prezidantino Josée Boccadifuoco la kasistino Reine Celiqva, la sekretariino Monique Eysseric .

Jeanne Bès anoncis, ke ŝi ne plu gvidos kurson venontjare . Ŝranko estis aĉetita por loki la multajn librojn en Lunel-Viel . **Retadreso de la grupo validas ekde nun : esperanto.montpellier@wanadoo.fr** Maritza Gutierrez (Kubo) ne venos en aprilo ; eblos renkonti ŝin en Béziers . Yvette Vierre memorigis la datojn de la 33a internacia semajno en Sète : de la 19a gis la 26a de aŭgusto . La enciklopedio « Wikipedia » estos teorie konsultebla ĉiun jaŭdon matene en la komputiko-ĉambro de MPT L'Escoutaire . Propono kontakti la eŭropajn deputitojn pri dulingvismo (nacia lingvo kaj esperanto) . Kiel kutime sekvis komuna tagmanĝo .

NDLR : niajn gratulojn al la nova skipo . Okaze de la marta kunveno, Serge Eysseric omaĝis al Annick Tora pro ŝia engaĝigo por la grupo kaj por esperanto (partopreno en 12 universalaj kongresoj) . Ni ankaŭ dankas ŝin pro la farita laboro . Pluvivu kaj prosperu la grupo de Montpellier !



Cercle d'Espéranto Biterrois
Maison de la Vie associative Boîte n° 41,
15 rue Général Marguerite,
34500 Béziers

Béziers, le 31 mars 2006

Saluton ,

Quelques informations sur les activités des espérantistes de Béziers :

➔ **18 avril**

accueil de Maritza Gutierrez Gonzales, espérantiste cubaine (journaliste à Radio-Havane). Elle animera une conférence le mardi 18 avril à 14h 30 à la Maison de la Vie Associative, sur le thème : vivre et voyager à Cuba. Guy Carquet assurera son accueil et son hébergement. Nous vous proposons de visiter la ville de Béziers le matin avec elle (RV : 10h devant chez Suzanne Authier, 9 rue Picot) et /ou de manger ensemble à la cafétéria du petit Casino (RV : 11h 30). Après la conférence, réunion conviviale autour d'un thé (ou ce que vous amèneriez) chez Suzanne.

Contact : Line Maurel 04 67 76 48 84

➔ **22 et 23 avril**

Présentation de l'espéranto et du cercle biterrois au forum social des hauts cantons avec un stand (<http://forumsocialdhc.free.fr/>). Vous pouvez nous aider à tenir ce stand, pour donner envie d'apprendre l'espéranto...

Contact : Laurence Esclapez : 04 67 30 87 10

➔ **Jeux**

En plus des cours régulier, nous avons testé un atelier de jeux pour une pratique orale et ludique de l'espéranto. L'expérience est positive, nous la renouvellerons. Pour cela nous comptons sur votre participation , apportez vos idées, vos suggestions, vos jeux...

Contact : Geneviève

➔ **Réunions mensuelles**

En général tous les 2èmes samedis du mois, à 14h 30, au bureau n° 3.5 à la Maison de la Vie Associative. Elles sont des moments de rencontre , de mise en place des projets, d'organisation du groupe et... de parler espéranto.

8 avril : Line racontera son voyage en Inde

13 mai : organisation des soirées récréatives du stage de Batipaume

24 juin : Pique-nique.

Contact : Suzanne Authier : 04 67 31 13 18

➔ **Du 7 au 14 juin**

Stage de Batipaume : Le thème retenu pour cette année est l'environnement .

➔ **11 juin**

Assemblée Générale de la Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon. Elle se déroulera sur le lieu du stage de Batipaume, à 10h 30. Possibilité de dormir et de manger la veille sur place et/ou le jour même manger à midi, mais réserver avant . Possibilité d'assister en soirée à la projection sur le voyage en car au congrès de Vilnius .

Contact : Jean Hénin : 04 66 32 86 36

Pour les repas : s'adresser avant le 15 mai à Lucette Négron 04 67 71 05 79 (HR)

Amike, ĝis revido.

La présidente, Suzanne Authier

1- Se vi manĝos en feriejo « Le Lazaret » :
Ĉu vi estas vegetarano ? Jes

1- Si vous mangez au « Lazaret »
Etes-vous végétarien ? Oui

2- Mi sekvos la kurson :
Je m'inscris au cours suivant :

- por komencantoj (pour débutants)
- paroligan kurson (cours 2^{ème} degré)
- perfektigan kurson (perfectionnement)

3- Ĉu vi volas ekzameniĝi ?
 jes
Kiu ekzameno ? :
Voulez-vous passer un examen ?
 oui
Quel examen ? :

Por ĉiaj klarigoj, telefonu :
Pour tous renseignements, téléphonez à :

Francio 04 67 54 15 43

fakso fax : 04 67 54 15 43

aŭ ou : jf.passarella@free.fr

Notu ĉi-tie vian ret-adreson :
Notez ici votre adresse internet :

«

INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

ESPERANTO, KULTURO KAJ PROGRESO
proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon
pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en
la havenurbo SÈTE, en ripoza parko de pluraj
hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala
periodo pro la bona vetero sed ekstere de la
somera troa homamaso.

Ĉe ni, vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ
banadon, ekskursojn kaj ... bonan manĝaĵon.

SÉJOUR LINGUISTIQUE EN BORD DE MER

ESPÉRANTO CULTURE ET PROGRÈS vous
propose d'apprendre ou de vous perfectionner
en Espéranto.


*Profitez-en pour passer en même temps
d'agréables vacances à Sète, dans un parc
reposant de plusieurs hectares au bord de la
Méditerranée pendant une période idéale
jouissant d'un temps agréable et en dehors de
l'afflux estival.*

*Chez nous, vous pourrez suivre des cours de
plusieurs niveaux mais aussi profiter de
baignades, excursions et..... bonne table*

de la 19-a ĝis la 26a de aŭgusto 2006

INTERNACIA SEMAJNO ĈIE MEDITERANEO


*inter maro kaj lagoj
niaj pasiaĵoj interdoniĝu*



Staĝo en Sète

LE LAZARET
centre familial
familieca feriejo



<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html> 

6

32-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
32ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPÉRANTO
19/08/2006 - 26/08/2006 Le LAZARET SÈTE (Francio)

Adreso dum la semajno : Maison Familiale « Le Lazaret »
Adresse pendant le séjour : La Corniche, rue du Pasteur Benoit 34200 SÈTE (Francio)
tel : 33(0)4 67 53 22 47 fax : 33(0)4 67 53 36 13

Programo : Programme :
Matene : diversnivelaĵoj kursoj *Matinée : cours de plusieurs niveaux*
Posttagmeze : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo *Après-midi : excursions, cours ou temps libre*
Vespere : distraj kaj kulturaj programoj *Soirée : programme culturel ou divertissements*
Ekskursoj : multaj eblecoj surloke *Excursions : nombreuses possibilités sur place*

Aliĝkotizoj : 55 Eu. antaŭ la 1-a de majo 2006 Adhésions : 55 Eu. avant le 1^{er} mai 2006
70 Eu. post tiu dato 70 Eu. après cette date
senpaga por malpli ol 26 jaraĝaj *gratuit pour les moins de 26 ans*

Loĝado : pluraj eblecoj Logement : plusieurs possibilités
- En « Lazaret » jen la prezoj por unu - Au « Lazaret », prix pour une semaine : chambre
semajno : ĉambro kaj 3 manĝoj tage et 3 repas par jour
La feriejo taŭgas por rulseĝuloj *Locaux adaptés pour fauteuil roulant*

1 persono en unupersona ĉambro : 396 Eu.	1 personne dans une chambre d'une personne : 396 Eu.
1 persono en dupersona ĉambro : 305 Eu.	1 personne dans une chambre de 2 personnes : 305 Eu.
1 persono en familia ĉambro : 277 Eu.	1 personne en chambre familiale : 277 Eu.
prezoj por infanoj laŭ peto	tarif pour enfants sur demande

Mendo de loĝado: post antaŭpago de 100 Eu. Réservation: après paiement d'un acompte de 100 Eu.
antaŭ la 15 07 2006 avant le 15 07 2006

- Eblas tendumi en la ĉirkaŭaĵo - Possibilité de camping en dehors de la ville
- Multaj hoteloj en la urbo - Nombreux hôtels en ville

Aliĝoj, klarigoj, mendoj je : *Inscriptions, renseignements, réservations à :*
ESPÉRANTO CULTURE et PROGRÈS: 5, rue du docteur Roux FR-34090 MONTPELLIER
tel/fakso : 33 (0)4 67 54 15 43

Poŝtkonto/CCP : n° : MON 73 73 65 E jf.passarella@free.fr

!!!! Konservu tiun parton !!!!!!!!!!! Conservez cette partie !!!!!!!!!!!

✂ 32-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
32ème semaine internationale d'Espéranto
SÈTE (Francio) 2006-08-19 / 2006-08-26

ALIĜILO BULLETIN d'INSCRIPTION

Familia Nomo
Nom
Persona Nomo
Prénom
Adreso
Adresse

tel.num. :
n° tél

- Mi loĝos en feriejo « Le Lazaret »
 Je logerai à la Maison « Le Lazaret »
Mi antaŭmendos unu liton *Je réserve un lit*
- en unu persona ĉambro
dans une chambre d'une personne
 - en dupersona ĉambro
dans une chambre de 2 personnes
 - en familia ĉambro
en chambre familiale
- Mi ne loĝos en Lazaret sed manĝos regule tie
 Je ne logerai pas au « Lazaret » mais j'y
mangerai régulièrement

Sendu la aliĝilon al : *Envoyez ce bulletin à*
ESPÉRANTO CULTURE et PROGRÈS
5, rue du docteur Roux

FR-34090 MONTPELLIER Francio
Pagu al : *Espéranto Culture et Progrès*
Payez à : *CCP n°: MON 73 73 65 E*

✂ **ATENTU: Bonvolu aldoni koverton kun adreso**
ATTENTION: joindre une enveloppe avec adresse

Grupo de Montpellier -daùrigo

Heredaĵo

La biblioteko de nia asocio ricevis konsekvenca kvanton da belegaj libroj . Tio estas tre interesa sed ni devas pensi, kiom da laboro kaj klopodoj, cerbumadoj rezultas por klasifiki kaj listigi ĉiujn librojn ! Gesinjoroj Eysseric iris serĉi plurajn faskojn da libroj tie-ĉi kaj tie, plie ili alportis novan meblon al Lunel, kie la nova biblioteko ne povus enteni ĉiujn novalvenantojn . Do, en « la kaverno de Ali Baba », pardonu, en la domo de Ges. Eysseric, komenciĝis longa kaj zorgoplena laboro . Sed, kiam ĝi finiĝos, ni havos grandan feliĉon foliumi, lerni...kaj havi emocian penson por nia amiko Armando Diez, kiu legacis al nia asocio parton de sia bela kaj interesa biblioteko .

J.B.

NDLR : Al tiu heredaĵo aldoniĝis pluraj dekoj da E-libroj, kiuj estis deponitaj ĉe la klubo de emeritoj de MGEN...kaj sekvos aliaj, kiujn posedis la grupo de Nimo...kaj fine kompletigos la federacio per aĉeto de novaj libroj . La tuto konsistigus riĉenhavan grup- kaj federacian bibliotekon, je la servo de ĉiuj esperantistoj de la regiono . Pri la temo ni diskutos en junio en Batipaume . Por la momento, Monique Eysseric kun la helpo de Josée Boccadifuoco, dediĉas multe da tempo por ripari, listigi, klasifiki la librojn . Niajn elkorajn dankojn pro la konservado de tiu « verda heredaĵo », nia komuna havaĵo .

Raporto Grin (daùrigo)

En la lasta SFS vi povis legi la skriban demandon al la Ministro pri Edukado, faritan de deputito de Lozère, kaj aperintan en J.O., pri la raporto Grin . La dua deputito ricevis respondon de S-ro de Robien, kiu tekstas jene en la franca : « C'est avec la plus grande attention que j'ai pris connaissance de ce dossier et je ne manquerai pas de vous faire connaître la suite réservée à votre démarche » . La ministro mem subskribis la leteron (tro ofte anstataŭas lin iu kabinetestro) . Pro konataj eventoj, la ministro estis ege okupata lastatempe... sed ni ne forgesos rekontakti la du deputitojn por informiĝi pri la sekvoj...

Nacia kongreso en Rennes (5a-9a de majo)

En la programo estas du koncertoj (de Kore kaj de Meven), «fest-noz» vesperon, ĥorstaĝon kun Meven kaj tutagan ekskurson al la vidinda urbo St Malo kaj al la fama monto Sankta Mikaelo . Kompreneble atendos aliaj surprizoj kaj diversaj kunvenoj .

« Okazas »

Ĝi ne plu aperas aparte kaj ĉiumonate sed kiel suplemento de « Le Monde de l'Esperanto » ĉiun duan monaton . Notu, ke la venontaj «eventoj» en nia federacio aperis en la kalendaro → Pri « Festo » fine de aŭgusto en Grésillon, jen invitilo :



7-14 juin

Stage avec cours de plusieurs niveaux et congrès de la fédération Languedoc-Roussillon le 11, à Batipaume/Agde (34). chrizo@worldonline.fr

4-8 juillet

Pratique de la langue, deuxième niveau. *Kvinpetalo**

11-15 juillet

Préparation à l'examen des hautes études. *Kvinpetalo**

18-22 juillet

Rencontre autour de la revue La Kancerkliniko. *Kvinpetalo**

25-29 juillet

Danses folkloriques. *Kvinpetalo**

3-11 août

Musique et langue, pratique de l'une par l'autre. *Kvinpetalo**

12-19 août

10e Rencontres internationales de Plouézec. jpducloy@club-internet.fr

15-19 août

Initiation à la traduction. *Kvinpetalo**

19-26 août

32e Semaine internationale au bord de la Méditerranée, à Sète. <http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto>

20-27 août

Festo, rencontre internationale de jeunes à Grésillon. www.esperanto-jeunes.org

*Adresses utiles

• **Château de Grésillon**
49150 Baugé, tél. +33 (0)2 41 89 10 34 <http://gresillon.org>
kastelo@gresillon.org


• **La Kvinpetalo**
Esperanto-Centro "Kvinpetalo"
FR-86410 Bouresse
tél./fax +33-(0)5-49-42-80-74
<http://kvinpetalo.org>
informoj@kvinpetalo.org

• **Kultura Esperanto-Centro**
CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds
tél./fax : +41-32-9267407 -
kce.esperanto@post.club-internet.fr

PERPIGNAN : René Llech-Walter fariĝis centjara .

La 30an de marto, nia samideano kaj amiko René Llech-Walter (dekstre, fotita en 1972 okaze de ekspozicio en librejo de la urbo) centjariĝis .

La kahelaro maldekstre iom spegulas la gravajn elementojn de lia vivo : kataluneco, muziko, Pireneoj, la mediteranea marbordo kaj kompreneble la verda stelo . Je la dato de lia centjariĝo koktelo kunigis multajn liajn geamikojn inter kiuj esperantistoj . Jean Amouroux, eks-sekretario de la federacio, salutis lin propranome kaj nome de ni ĉiuj, donacis al li belan medalionon (vidu ĉi-poste, efektiva diametro 16 cm) kaj interparolis kun la jubileulo en esperanto, konkludante tiel : "L'espero, l'obstino kaj la pacienco", skribis Zamenhof, estis ankaŭ por vi « la voj' elektita » . Vi eltenis kaj vi pravis . Unu solan vorton mi volas aldoni : DANKON !



Ni ankaŭ dankas pro tiom longa sindonemo por la internacia lingvo . Gazetartikoloj aperis en « L'Indépendant » de la 30a de marto kaj de la 5a de aprilo . *En la centro de la bildo, Jean Amouroux, Colette Llech-Walter kaj René Llech Walter* . Por nia bulteno, Jean Amouroux verkis artikolon por iom resumi la riĉan agadvivon de nia amiko . **Gratulojn !**



PORTE D'ESPAGNE. Dernièrement, au Clos des Lys, René Llech-Walter a fêté ses 100 ans, entouré de très nombreux amis. Celui qui a participé à tant d'associations culturelles (musique et langue catalanes, espéranto, jeux floraux du Genêt d'Or etc.) a reçu un nombre incalculable d'hommages. Il fallait souligner la présence du Père Miret, abbé de Montserrat, venu expressément féliciter René Llech-Walter qui avait également fait partie des promoteurs de la messe en catalan en l'église Saint-Mathieu. *Photo M. C.*



Alvenis la tago

Fine de marto pasintjare, S-ro Llech-Walter telefonis kaj invitis min : « Ho, ne estos granda kunveno . Ni estos nur kelkaj . Venontjare estos la oficiala festkunveno, kiam mi estos centjara » . **Alvenis la tago** . S-ro Llech-Walter estas centjara kaj festata li estis . René Llech naskiĝis en Perpignan la 30-an de marto 1906 .

Ne malofte venis al li (kaj al mi) demandoj pri la signifo kaj prononco de lia nomo . Tipe kataluna estas la nomo Llech (prononcu Ljek) el la latina « laicus », « laica », laicum », « laikulo » en esperanto . Je sia edziĝo, al sia familia nomo Llech, li aldonis tiun de sia edzino denaske Walter .

Dekkvinjaraĝa, kun sia iom pli aĝa frato Jean kaj kelkaj samaĝuloj, li kunfondis klerigan rondeton, « le Cénacle », kaj luis nemeblitan lokalon sur sakstrato de Perpignan . Hazardo kondukis la entuziasman grupeton al Joseph Sans, unu el la nemultaj postvivantoj de la antaŭmilita grupo ESPERANTO de Perpignan . J. Sans konsentis mebli la luitan lokalon per meblaro de la iam esperantista grupo je la kondiĉo, ke li povu tie organizi kurson de esperanto . Tiel proponite, tiel farite . La du fratoj Llech eklernis la lingvon, tuj alportante junecan sangon al la esperanto-movado loka kaj regiona . Je Pasko 1923 kunvenis en Marseille reprezentantoj de la grupoj esperantistaj de urboj situ-antaj de la itala ĝis la hispana limoj, fondante la « mediteranean esperantistan federacion » . René Llech reprezentis la grupon de Perpignan .

De la privata prikomerca lernejo Pigier en Perpignan, kie li instruis stenografion, R. Llech militser-vis en Parizo (1926-1928) kiel staba sekretario ĉe la « ministerio pri milito » (tiam nomo) ĝuste pro lia stenografio-kapablo. En Puteaux li retrovis sian fraton, kiu tie embrie kreis sian propran prikomercan lernejon. En Perpignan, dum jardekoj, la « Ecole Commerciale » de Jean Llech ĝuis renomon. Aktive partoprenante en la parizregiona esperantista vivo, la du fratoj aparte enversigis en la Instituton pri stenografio de Pierre Flageul, kiu adaptis la konatan stenografiosistemon Duployé al esperanto. La du fratoj krome organizis la kongreson de la parizregiona federacio de esperanto en Puteaux (6-an de majo 1928) kun partopreno de la tiamaj tenoroj de la movado: Bastien, Couteaux, Cart, Houbart kaj aliaj.

Ne longe poste la du fratoj revenis en Perpignan kaj vigle daŭrigis la poresperantan agadon, sed Jean ne plu estis tre aktiva. René restrukturigis la interdepartementan federacion sub la nomo « Langvedoka Rusiljona » kaj iĝis ties prezidanto. René Llech-Walter (RLW) krome aktivis en la sino de la kleriga « Politeknika Asocio » de Perpignan, kiu, dum tre multaj jaroj, aŭspiciis kursojn kaj prelegojn de kaj pri esperanto. La militeksplozo ĉion ĉesigis.

Militkaptita en 1939, RLW revenis en Perpignan pro malsano la 26-an de septembro 1941. Ĉar D-ro Zamenhof estis Judo, laŭ la gvidlinio de la registaro de Vichy, la dumilita urbeŝtato de Perpignan ŝanĝis la nomon de la strato honore al la iniciatinto de esperanto. La nomon « Zamenhof » ĝi retrovis en 1944.

En 1943 RLW rekomencis la publikajn kursojn de esperanto kaj instigis la starigon de esperantista komitato por kunhelpo al la militkaptitoj. La « Journal Officiel » de la 23-a de decembro 1944 indikas la restarigon de la langvedoka-rusiljona E-federacio kun sidejo ĉe RLW.

En 1946 li kunfondis « les gais troubadours catalans », plektorkestron, kies programo, parte franclingva, parte tradicie rusiljona, populariĝis dank' al la radioelsendoj de « Perpignan-Roussillon » - radio kiu dissendis ankaŭ kurson de esperanto - kaj dum bonfaraj aŭ kulturaj matineoj. « Amic René » (=RLW) ne nur rakontis (ja li iam vizitis la kurson pri elparola maniero ĉe la konservatorio de Perpignan), sed li kapablis muzikludi kaj komponi ĉu por la muziko, ĉu por la teksto. Antaŭ jaroj la nomo de la trupo perdis la epiteton « gajaj ». Ja, klarigis RLW, ni maljuniĝis kaj kiam ni partoprenas en funebra ceremonio, ne estus deca, ke ni estu « gajaj », tamen ni restas « katalunaj trobadoroj ». Ĉiujare li organizis tutagan ekskurson por la « gajaj trobadoroj ». La ekskurso fakte kongruis kun la jarkongreso de la langvedoka-rusiljona E-federacio. Pro tio, en la 1950-aj jaroj, buso da partoprenantoj el Perpignan (la deir-kaj reir-punktoj ĉiam estis ĉe la Zamenhof-strato) vizitis la federacian kongreson en Armissan, Narbonne, Montpellier, Alès, Nîmes. En la buso, dum la vojaĝo, gitaristo aŭ mandolinisto pluregalis nin, lernantojn de esperanto kaj simpatiantojn. Mi diras « nin », ĉar mi estis unu el tiuj, kiuj partoprenis en la kvar lastaj ĉi-supre nomitaj kongresoj (1952-1955).

En la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj li vizitis sennombrajn grupojn kaj lernejojn tra la lando kaj en Sud-Katalunio, ofte prelegante kun lumbildoj, ankaŭ por ekstera publiko, pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto en kiuj li partoprenis. En 1957 li transiris de la vic-prezidanta al la prezidanta posteno de Unuiĝo Franca por Esperanto (1957-1967), kies honora prezidanto li estas. De 1955 ĝis 1960 li estis estrarano de UEA, kies delegito en Perpignan de jardekoj ĝis nun li estas. Kiam UEA akiris sian nunan domon en Roterdamo, li sendis sufiĉe altan monsumon, tiel ke la librostokejo de la Centra Oficejo nomiĝas « Ĉambro R. Llech-Walter ».

La prezidantecon de la E-federacio « Langvedoko-Rusiljono » RLW rezignis la 17-an de oktobro 1982 dum aŭtuna federacia laborkunsido en Sète, sed li daŭre agadis surloke inter alie disponigante lokalon kun montrofenestro sur la avenuo al la stacidomo por kursoj kaj kunvenoj.

Ni krome notu, ke en 1983 li estis elektita « Majoral du Félibrige », plej alta grado - kaj la sola en Rusiljono - unu el la anoj de la konsistorio de la literatura skolo, kiu ekde 1854, fondita de Frédéric Mistral, celas redoni al la provenca lingvo ĝian rangon kiel literatura lingvo.

Malgraŭ la paso de la jaroj li ĉiam rifuzis la premon de la aĝo. Kiam la revuo « Esperanto » anoncis, ke li estas prezidanto de la organiza komitato por la 73-a franca kongreso de esperanto en Perpignan spite al sia « alta aĝo », li « protestis energie », skribis li al la redaktoro, ke, nur 75-jara, por li « esperanto estas afero ne de AĜO, sed de AGO » (tiel).

Sen la plej eta ombro de dubo ni povas diri, ke René Llech-Walter atingis tutmondan rekordon. Same kiel por multaj el ni, Esperanto estis por li ĉiutaga realaĵo kaj baraktado. La diferenco estas ke por li tio daŭras jam de 85 jaroj. Seninterrompe.

Jean Amoureux



Renkonto kun Claude Hagège (lingvisto kaj profesoro ĉe Collège de France)

Claude Hagège estas fama lingvisto, kiu ĵuse skribis gravan libron : « Combat pour le français » (batalo por la franca lingvo) . En tiu libro li analizas la lingvajn problemojn en la tuta mondo . Li montras, ke la franca lingvo perdas influon, ĝia influfero konstante malkreskas fronte al la angla lingvo . Fakte, li pensas, ke la du ĉefaj kaŭzoj estas : unue, la grava, gravega laboro de la anglalingvanaj premgrupoj kaj due, nia propra akcepto, komplezo por nia snobeco .

Lastan semajnon, li estis invitita de la librejo Sauramps en Montpellier, por prezenti sian novan libron . Mi aĉetis la libron kaj, antaŭ la prelego, dum la subskribado, mi demandis al li skribi sur la unua paĝo : « Al Serge kaj Monique, fervoraj defendantoj de la dulingveco, patrina lingvo kaj frata lingvo » . Li subite kaj intense rigardis min kaj demandis :

-« Kio estas la frata lingvo ? Ĉu estas la okcitana lingvo ? »

-« Ne, estas la Esperanta lingvo » . Li ridetis kaj diris al mi :

-« Poste, mi prelegos en salono Molière . Venu kaj petu min tiam paroli pri la Esperanta lingvo » .

-« Volonte ! » .

Kiam ni alvenis en salono Molière, ĝi estis plenplena . La libristo rapide prezentis CH kaj poste li metis diversajn demandojn . La prelego multe interesis la ĉeestantojn kaj CH montriĝis tre kompetenta aŭtoro .

Je la fino de la prelego, CH petis la ĉeestantojn meti demandojn . Mi petis lin paroli pri la Esperanta lingvo, kiel pli frue interkonsentite . Li tute volonte respondis dum dekkvin minutoj . Li bone konas la historion, la gramatikon, la vort-trezoron de nia lingvo . Li diris, ke li havas multe da libroj pri esperanto hejme, ke li havas kelkajn esperantistajn konatojn, kun kiuj li interŝanĝas ideojn . Sed, fakte, li diris ke li, fervora amiko de lingvoj, de ĉiuj lingvoj, ne povas vere ŝati tiun kreitan lingvon . Li ankaŭ diris, ke la defendantoj de la esperantista lingvo estas aktivuloj, kaj eĉ, afable ridetante, ke mi estas la « deĵoranta esperantisto » (de Montpellier) .

Mi aparte ŝatis lian konkludon : « Foje, Esperantista amiko diris al mi : se vi ne volas la esperantan lingvon, vi havos la anglan lingvon. Tiu frazo ŝanceligis min »

Depost tiu renkonto mi atente kaj profunde legis lian libron . Tiu homo mirinde laboras pri nia franca lingvo, li estas amiko de ĉiuj lingvoj, li preskaŭ estas samideano .

Serge Eysseric

NDLR : Bone, ke CH maturiĝis kaj nun konscias pri la danĝero de hegemonia lingvo . Por kompletigi la raporton, jen parto de franclingva artikolo de CH aperinta en "Le Monde" la 28an de februaro 2006 : « Pourquoi il faut défendre mordicus l'usage du français » . Temis tiam pri la ratifo de la protokolo de Londono pri la patentoj, kiu klare favoris la anglan lingvon kaj estis rifuzita de la nacia asembleo .

« La France va-t-elle donc s'engager toujours plus avant dans la voie d'un déclin annoncé, dont beaucoup de Français se font les complices, naïfs ou trompés ? La ratification du protocole de Londres n'améliorerait en rien la compétitivité des entreprises françaises . En revanche, on peut garantir qu'elle conduirait au déclin de la France face à une volonté hégémonique anglophone qui ne peut considérer qu'avec une impatience agacée le maintien même de plus en plus compromis, d'une pulsion de diversification dont la France est encore, dans le monde d'aujourd'hui, le modèle évident . Méditons les mots des grands...Américains dont le regard n'est pas obscurci par les illusions, et par exemple celui-ci : « La mondialisation n'est pas un concept sérieux . Nous l'avons inventé pour faire accepter notre volonté d'exploiter les pays placés dans notre zone d'influence » (J.K. Galbraith, illustre économiste) .

